

# Lingvo, nepre necesa ilo de la eŭropa publika spaco

Robert Joumard, Henri Paraton, Michel Christian & Jean-François Escuit  
(komisiono Eŭropa Konstruado de Attac Rodano)

la 21an de septembro 2007

Por ke ĝi estu demokratia, la eŭropa politika vivo bezonas publikan spacon, kiu prezentas kondiĉojn de efektiva eŭropa publika debato komuna, ensceniganta kontraŭdirojn kaj konsentojn inter popoloj kaj inter civitanoj. Nu Socio estas dividita inter tiuj, kiuj povas (rajtas) paroli - malmultaj ili estas - kaj la amaso, kiu nur silentendas; inter tiuj, kiuj estas informitaj cxar ili sukcesas informiĝi je diversaj fontoj - ankoraŭ pli raraj estas ili - kaj la amaso, kiu ricevas novaĵojn nekompletajn, misformitajn, konverĝintajn (0).

Necesas organizi por ĉiuj, rajton pri pluralisma kaj kontraŭdira informado (2). Tiu rajto estas elementa kondiĉo de la demokratia vivo: la eŭropaj civitanoj devas havi la eblecon informiĝi kaj informi la aliajn eŭropajn civitanojn, ĉar estas ili, kiuj devas debati. Do temas pri ne nur alirorajto pri informado sed ankaŭ diskonigorajto de informado.

Krom multaj aliaj aspektoj (3), la konstruado de komuna politika spaco metas la problemon de lingvaj diversecoj, pro la ĉie-esto de la lingvo en la homa okupiĝo. Fakte ĉiu limigo de debato ene de la limoj lingvaj aŭ naciaj, implikas la defendon de naciaj intereso, tiel pravaj ili estas. Nu, la ĝeneralan intereson de ĉiuj Eŭropanoj ni devas kune debati. Cele tion ni, aktoroj de la publika spaco (civitanoj, gazetaranoj, politikistoj...), kapablu kompreni unu la alian.

## De la greka al la *globish*

La elitoj ofte uzis lingvon malsaman al tiu de ilia popolo por faciligi ties regadon: tio okazis pri la greka en Romo, pri la latina en la mezepoka Eŭropo, pri la franca en granda parto de Eŭropo dum la 18<sup>a</sup> kaj 19<sup>a</sup> jarcento. Hodiaŭ, la angla anstataŭis ilin ĉiujn. Temas pli ĝuste pri la angla-usona, la *globish*. La *globish* estas unue ia *lingua franca*, kiu utilas por mendi kafon en Tamanraseto same kiel en Pekino, kaj kiu ankaŭ utilas por adjudiki en Bruselo. Sed ĉefe, male de la angla, ĝi estas ege malriĉa lingvaĵo, kiu lernigas aŭ devigas malriĉan pensmanieron. Eblas kompari ĝin al la lingvo de la *III<sup>a</sup> Reich*, germana lingvo modifiĝinta, malriĉiĝinta, kiu estis tendence perfortigata, kun vortoj similaj al « malgrandaj dozoj da arseniko », por fariĝi lingvo de ideologiado (4, 5, 6). Ĉu ne la *globish* estas ankaŭ lingvo modifiĝanta, malriĉiĝanta, tendence perfortigata, por fariĝi lingvo de la libernegocisma ideologiado, al kiu ĝi estas kunligita per ia natura solidareco (7)? *Globish* estas la ĵargono de la tutmondaj elitoj, kiun ili iompostiome altrudis estiel lingvo portutmonda, kaj pere de kiu ili projektas trudi ŝtele iliajn nurajn pensmanierojn. Ĉu ne tio estas unu el rimedoj, kiujn ili uzas por akiri ilian regadon super la popoloj (8)? La sukceso de la *globish* alkondukas krome al marĝenigo de la naciaj lingvoj kaj al revalorigo de la regionaj lingvoj, kiel vidiĝas, ekzemple, en Hispanio kaj en Germanio (9). La plirapidiga konverĝado al lingva hegemonio de la angla, se nenio malhelpas ĝin, estas danĝera por la lingva kaj precipe kultura diverseco, kaj zorgodona pro la politikaj kaj geopolitikaj konsekvencoj.

La uzado de tiu nacia lingvo por la internaciaj rilatoj havigas plie grandegan avantaĝon al la angloparolantaj membroj de la Eŭropa Unio, Britio kaj Irlando, kiuj ludas kompreneble gravan rolon

en la instruado de ilia lingvo, kaj kiuj, male de iliaj partneroj, havas neniujn elspezojn pri tradukado kaj interpretado. La entreprenoj de la ne-angloparolantaj landoj devas elteni pezegajn elspezojn pri profesiaj tradukado kaj interpretado por labori en samaj kondiĉoj kiel iliaj angloparolantaj homologoj. Ni ne forgesu, ke al la rektaj kostoj rilate al dungitaro aldoniĝas pezaj kostoj nerektaj kaj organizadaj (plilongigo de la labortempo por la nepra posta tradukado...). Nuntempe, Britio ŝparus nete almenaŭ 10 miliardojn da eŭroj jare, kaj eĉ 18 miliardojn se ni enkalkulas la multiplikan efikon de kelkaj komponantoj de tiu sumo, kaj ankaŭ la profitprodukton de tiu libera kapitalo (10). Tiu cifero, kiu samvaloras kiel proksimume 1 % de la nacia malneta enspezo de Britio ne konsideras la diversajn efikojn simbolajn, kiel ekzemple la avantaĝoj, kiujn havas la parolantoj de la hegemonia lingvo en ĉiuj negocaj kaj konfliktaĵaj situacioj okazantaj en ilia lingvo. Tiun sumon eblas kompari kun la buĝeto de la Eŭropa Unio (116 miliardoj da eŭroj en 2007), aŭ kun la kontribuado de Britio al tiu buĝeto t.e. 15 miliardoj da eŭroj. Kompreneble, ne la angla lingvo mem kulpas, sed la lingva hegemonio, kia ajn estas la lando aŭ landaro al kiu tio profitas.

La alia komuna lingvo, esperanto, naskiĝinta de pli ol unu jarcento, ne vere famiĝis ĝis nun. Ĝi ne sukcesis venki la antaŭjuĝojn, kiujn ĉirkaŭas ĝin, kaj kiuj plejofte baziĝas sur nura nesciado (10).

### **Sed kio estas lingvo**

La lingvistoj lernigas nin, ke la lingvoj ne estas neŭtralaj. Ĉiu lingvo esprimas siajn proprajn konceptojn kaj vehiklas apartan mondan vidmanieron. Fakte, de la 16a jarcento (« Diverse lingue sono atte a significare diversi concetti » (11) ni scias, ke diversaj lingvoj kapablas esprimi diversajn konceptojn: la diverseco de scioj kaj tiu de lingvoj estas interligitaj. Tiel estas la konceptoj pri laikeco kaj publika servo, kiujn bonege esprimas la franca lingvo, sed, kiujn multaj aliaj lingvoj malfacile tradukas per longaj ĉirkaŭfrazoj, same kiel la koncepto pri la brita common law, iaspeca parola ĵuro malfacile komprenebla por tiu, kiu ne estas anglalingva, aŭ en alia kampo, la koncepto pri la business plan, ia planizado por societo, kiun la franca uzas tian, kia ĝi estas, sen plejofte vere kompreni la ĝustan sencon. Ankaŭ la Historio multe influis al la esprimoj de la publika medio. Ni pensu, ekzemple, pri la « Etats généraux » (Ĝeneralaj Ŝtatoj) aŭ « cahiers de doléances » (Plendadaj Kajeroj), kiuj, eĉ tradukitaj, havas malmulte da senco por la plejmulto el la Eŭropanoj. La vortoj « nacio » aŭ « popolo » respondas al nocioj ne nur malsamaj sed eĉ kontraŭaj, kiam ili estas uzitaj germane – kun ia imperia kaj genta konotacio – aŭ france, kie, tiam ili akiras ian politikan sencon pri emancipado. Same, kiam oni parolas pri « libereco »: en Francio, « liberté » elvokas sendire kolektive konkeritajn rajtojn, agnokitajn de la leĝo kaj garantiitajn de la ŝtato; en Britio « liberty », male, kondukas al la limigo de la rolo de la publika potenco. Tiuj konceptoj kaj la lingvo, kiu esprimas ilin, estas kunligitaj kun la politika kunteksto kaj, returnen, influas ĝin (8).

La filozofoj de la 18a jarcento kaj parte la anglosaksa filozofio, tielnomita analiza, kontraŭis tiun lingvan specifon. La filozofoj de la 18a jarcento batalis kontraŭ la « antaŭjuĝoj » intermiksita en la lingvoj. La lingva politiko de la Terero, kvin jaroj post la franca revolucio, daŭrigis tiun politikon. Ĝi celis detruon de la politikaj antaŭjuĝoj unuigitaj kun la diversaj lingvoj parolataj en Francio, kaj ankaŭ kaŝitaj ene de la Franca lingvo mem. Koncerne tiu programo, ĝi fiaskis. La franca lingvo ne estis elpurigita je sia franca karaktero (9). Koncerne la anglosaksa filozofio, gravas por ĝi, almenaŭ kiel inklino ĝin, la koncepton, sed ne la vorton, la lingvon, tiun universalecon de la koncepto, indiferece je ĝia esprimo. Tutegalas la vestoj, la lingvoj kiujn ĝi surmetas. Kaj traduki estas nure alivesti sin. Sed la universala karakterizo ne naskiĝis.

Male al tiuj nocioj, lingvistoj opinias ke, en ĉiu lingvo gravas, kaj karakterizas ĝin, la dubsencaĵojn kiujn ĝi entenas : la ambiguoj diferencigas la sensojn de la lingva vortprovizo en literaturo, tekniko aŭ politiko (4, 12). Kaj, ĝisekstreme, lingva nacialismo supervalorigas la specifojn de la nacia lingvo, ĝian vidmanieron de la mondo kaj neas ke aliaj lingvoj estas same valoraj kaj same riĉaj. Lingvo estas do santempe nura komunikilo taŭga por traduko de multnombraj konceptoj kaj ideologia ilo speciale taŭga por esprimo de iom da konceptoj sek ne iuj ajn.

## Eblaj lingvaj solvoj por publika spaco

Populara suvereneco kaj konstruado de publika spaco, kies vehiklo estas la lingvoj, do postulas, ke tiuj ĉi permesu al ĉiu esprimiĝi kaj esti komprenita sen trudi al li fremdajn konceptojn kaj sen kontraŭi al la eùropa kultura diverseco. Do nepre necesas ne trudi al eùropaj civitanoj, tian aŭ alian nacian kulturon kaj ĉefe, kiam tiu kulturo ne estas eùropa, sed principe usona, kiel *globish* (13).

Diversaj neekskluzivaj solvoj eblas:

- Aliri al transdoniva kaj senkulturiĝita anglo, sed ĉu eblas ? La lingvistikistoj forte dubas pri tio, kiel ĉi-suprevidite, kaj insistas pri la pensmalriĉeco, kiun ĝi permesas. Ĉiukaze, eĉ senkulturiĝita, la angla lingvo ĉiam similos al usona lingvo. La ekonomika, kultura kaj politika kosto de nacilingva hegenomio estus gravega.
- Disvolvi superecon de kelkaj lingvoj meze de eùropo : la germana, la franca, la usonangla (14); sed tio ne ŝanĝus la disdonon, forigus rapide la aliajn eùropajn lingvojn, kaj nenio pruvas ke tio bremsus la hegemonion de *globish* .
- Fortigi la eùropajn rekomendojn (t.e. sistematike instrui po 2 fremdajn lingvojn aliĝlande), ĉu devigante tiujn rekomendojn, ĉu instruante al ĉiuj eùropanoj po 2 aŭ 3 eùropajn lingvojn, por ke la plej parto flue uzu ilin, kiel ekzemple okazas en multaj afrikaj landoj. Ekonomike tiu scenaro estus tiel kosta, kiel la hegenomia scenaro pri angla lingvo, sed reduktegus la transdonojn kontraŭajn al justeco kaj la malegalecojn inter eùropanoj. Ĝi prezentas veran riskon de nestabileco kaj erozio favore al usonangla lingvo, krom striktegaj kunligitaj mezuroj (10).
- Stimuli interkomprenon meze de ĉiu lingva familio, ekzemple sine de latinidaj lingvoj, meze de slavaj lingvoj, sine de germanaj lingvoj, kiel jam okazas meze de skandaniaj lingvoj, kio povus esti solvo por kurt-kaj-mezproksima templimo (13). Per interkomprenado, oni subkomprenas kapablecon kompreni fremdan lingvon sen scii nek paroli nek skribi ĝin: ĉiu parolas kaj skribas sian propran lingvon kaj scipovas kompreni kaj legi tiun de aliulo (15). Se tio favoras interŝanĝon meze de samlingva familio, tio ne estas sufiĉa por publika spaco vere eùropa. Unua kutimo, kiun ĉiu povas realigi estas uzpreferi longajn esprimojn, sed sen ambigueco, al sintezaj esprimoj aŭ vortoj, malsame komprenitaj laŭ la medio kaj la kuturo.
- Roligi esperanton kiel komuna lingvo por futuraj generacioj. Estas artefarita lingvo, iomete kiel moderna hebreo, kiu tamen trudiĝis en Israelo. Estas lingvo nenies lando kaj ĝia uzado donus nek ekonomikan nek simbolan avantaĝon al tia aŭ alia lando. Ĝia uzado tradukiĝus per neta ŝparado je almenaŭ 25 miliardoj da eùroj por la tuta Eùropo (Britio kaj Irlando inkluzivitaj), kaj je preskaŭ 5 miliardoj por Francio (10). Lerni tiun lingvon estas ege pli facila ol ĉiujn aliajn. Kiam necesas 1 500 horojn por atingi normalan nivelon angle, oni taksas ke nur bezonas trionajn ĝis dekonajn horojn por atingi saman nivelon esperante (10, 16, 17). Sufiĉus devigi la nuran esperantan instruadon, plie de la nacia lingvo, ĉiu alia lingvo estante laŭvola. Nun estas lingvo sen tro da kultura tradicio, kiun ankoraŭ ne multe riĉigis pensekzercado (*NDT: kun pli ol 30 000 esperantaj libroj, multnombraj diskoj, oni povas paroli pri esperanta kulturo*). Tamen kial ĝi ne povus iĝi kultura lingvo, la eùropa civitana cemento ? La ĝenerala konferenco de « UNESCO » en 1985, rekonis « la vastajn eblecojn proponitajn de esperanto por internacia kompreno kaj komunikado inter malsimilnaciaj popoloj ». La kutimaj forpelaj reagoj kontraŭ ĝi, tamen devus esti vinkitajn, aparte per informado kaj komuna volo.

Ĉiukaze, necesas forta politika volo por instituciigi tiujn vehiklojn de rektaj interŝanĝoj kaj de identeco komuna inter la eùropaj gecivitanoj, kiel nur la ŝtatinteragado permesis al kelkaj lingvoj (hungara, fina, ĉeĥa, estonia, modernebrea, ktp. ) supervivi aŭ adaptiĝi al moderneco (7).

Kontakto: [robert.joumard@wanadoo.fr](mailto:robert.joumard@wanadoo.fr)

Tradukita esperanten : Gérard Altmayer, Béatrice Devais, Luc Gouverneur, Franjo Leveque kaj Guy Martin (Esperantaj kluboj de St Nazaire kaj Nantes - Francio)

## Referencoj

1. Mort d'une liberté. Techniques et politique de l'information. J. Kayser, Plon, 1955.
2. Pour une appropriation populaire des médias. Groupe de travail "médias" du Parti communiste français, novembre 2005, 26 p. [www.forum-alternative.fr/IMG/pdf/note\\_media.pdf](http://www.forum-alternative.fr/IMG/pdf/note_media.pdf)
3. Quelle Europe construire ? Les termes du débat. R. Joumard, H. Paraton, M. Christian & JF. Escuit, 2007, 46 p. [http://etienne.chouard.free.fr/Europe/messages\\_recus/Quelle\\_Europe\\_construire.rtf](http://etienne.chouard.free.fr/Europe/messages_recus/Quelle_Europe_construire.rtf) ; version espagnole : [http://etienne.chouard.free.fr/Europe/messages\\_recus/Que\\_Europa\\_construir.rtf](http://etienne.chouard.free.fr/Europe/messages_recus/Que_Europa_construir.rtf)
4. Les « intraduisibles » en sciences sociales. B. Cassin, Traduire, n°212, 2007, p. 51-61.
5. LTI, la langue du IIIe Reich. Carnets d'un philologue. Victor Klemperer, trad. fr. E. Guillot, Albin Michel, 1996 [Leipzig, 1975].
6. Don't speak English, Parlez globish ? J-P. Nerrière, Eyrolles, 2e éd. mise à jour et complétée, 2006.
7. Combat pour le français. C. Hagège, Odile Jacob, Paris, 2006, 244 p.
8. Être et parler français. P.M. Coûteaux, Perrin, 2006, 400 p.
9. L'antinomie linguistique – Quelques enjeux politiques. J. Trabant, in M. Werner (dir.), Politiques et usages de la langue en Europe, éd. MSH, 2007, p. 67-79
10. L'enseignement des langues étrangères comme politique publique. F. Grin, Haut conseil de l'évaluation de l'école, Paris, 2005, 125 p. [http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport\\_Grin.pdf](http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf)
11. Dialogo delle lingue. S. Speroni, 1542, in M. Pozzi (dir.), Discussioni linguistiche del Cinquecento, Turin, UTET, 1988, p. 279-335.
12. La traduction des brevets : quand la technique rencontre le droit. J. Combeau, Traduire, n°212, 2007, p. 62-69
13. Un monde polyglotte pour échapper à la dictature de l'anglais. B. Cassen, Le Monde Diplomatique, janvier 2005, 6 p. [www.monde-diplomatique.fr/2005/01/CASSEN/11819](http://www.monde-diplomatique.fr/2005/01/CASSEN/11819)
14. Une constitution européenne. R. Badinter, octobre 2002. [www.aidh.org/Europe/Conv\\_05badin.htm](http://www.aidh.org/Europe/Conv_05badin.htm)
15. Eùropaj universitatoj disvolvis iniciatojn kaj interkomprenadajn programojn, kies la projekton GALATEA : <http://www.u-grenoble3.fr/galatea/> et <http://www.galanet.eu>.
16. L'espéranto. B. Flochon, in Gauthier (éd.), Langues : une guerre à mort, Panoramiques, n°48, 2000, p. 89-95.
17. Studio della commissione sulla lingua internazionale (*Studo de la komisiono pri la internacia lingvo*). Ministère de l'instruction publique / Ministero delle pubblica iztruzione, Bolletino ufficiale del Ministero delle pubblica iztruzione, n°21-22, 1995, p. 7-43. [www.internacilingvo.org/public/126\\_plena.htm](http://www.internacilingvo.org/public/126_plena.htm)